



S-ro ANDREO PIÑO ALEGRET
Advokato
Vocdonanto de la Grupo Valencia kaj Administranto
de LA SUNO HISPANA.

LA SUNO HISPANA *

ENHAVO: 1. Avizo.—2. Konstanta Komitato de la Kongreso de Esperanto (1.ª cirkulero).—3. 2.ª Universala Kongreso Esperantista de Genevo.—4. Sciigoj.—5. Bibliografio.—6. Esperanto en la militistaro.—7. Novaj amoj de H. S. p. p. E.—8. Anoncoj.

AVIZO

Pro manko da loko ni estas devigataj haltigi la publikigon de nia felietono «La Jeso de Knabinoj» ĝis la fino de la raporto pri la 3.ª Kongreso de Esperanto en Genevo. Ni penas por la baldaŭa repaero de la bela Moratina komedio.

AVISO

Por falta de espacio nos vemos obligados á suspender la publicación de nuestro folletín «El sí de las niñas» hasta terminar la narración del 2.º Congreso de Esperanto en Ginebra. Trabajaremos para que la bella comedia de Moratin reaparezca pronto.

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESO DE ESPERANTO

I.ª CIRKULERO

Pri la fondo de Esperantistaj Konsulejoj

Multaj esperantistoj faris proponojn aŭ petis sciigojn, ĉu en gazetoj, ĉu skribante al la Centra Oficejo, pri la fondo de Esperantistaj Konsulejoj, konsilita de la 2.ª Kongreso.

Ni kredas do utile ne atendi la eldonon de l'Oficiala Protokolaro, nunte mpe en preparo, por konigi al vi la nunan staton de la demando.

Tiu demando estis prezentata al la Kongreso per raporto de l'Organiza Komitato, kies teksto estas aldonita al tiu ĉi cirkulero.

Jen, aliflanke, resumo de la Protokolaro, rilate al ĝia diskutado:

«La Kongreso unuvoĉe aprobis la konkludojn de la raporto, kaj diskutadis pri la vortoj: «Konsulo» kaj «Konsulejo». Ĉar, en kelkaj landoj, la uzo de la vorto «Konsulo» povas esti malpermesata, la Kongreso, akceptante oficiale la vortojn «Konsulo» kaj «Konsulejo», konsilas al la personoj, kiuj ne povos uzi tiujn vortojn, ke ili uzu aliajn, kaj prefere «Esperantista Agentejo» kaj «Esperantisto Agento».

Kiel vi rimarkos, la Kongreso kontentiĝis aprobante la principon proponitan de l'Organiza Komitato, nome, ke la fendo de konsulejoj estas loka afero, sed ke, por pligrandigi ilian aŭtoritaton, estas rekomendinde ke ili estu kreaĵoj de la esperantistaj Societoj aŭ Grupoj: memkompreneble estas ke Konsulejo, kies ŝildo portos la surskribon «Esperantista Konsulejo de la Societo de...», ĝuos pli grandan estimon, ol alia.

Sed ni devas atentigi vin pri tio, ke la Centra Oficejo kaj la Organiza Komitato havas nenian rajtigon por elekti Konsulojn, kaj ke tiaj proponoj ne devas esti direktataj al ili, kiel oni jam faris malprave.

Rilate al tiu afero, la Centra Oficejo povas nur ludi la—cetere tre utilan—rolon, kiun difinis ĝia titolo mem, t. e. alcentrigi la sciigojn pri konsulejoj regule fonditaj laŭ la deziro de la 2.^a Kongreso, por konigi ilin al la esperantistaro. Tio efektiviĝos per la publikigo de la dua eldono de l'*Esperantista Societaro*, kiu aperos ĉirkaŭ la fino de januaro (la unua eldono, prokrastita pro la Kongreso kaj pro la neeviteblaj malfacilaĵoj de l'komenco de tia entrepreno, estos baldaŭ sendata al vi, kiel specimeno).

Ni petas do insiste ĉiujn societojn kiuj fondos konsulejojn kiuj naskiĝos propramove, ke ili bonvolu informi, kiel eble plej baldaŭe post la organizo, la Centran Oficejon.

En la nomo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj de Esperanto,

La ĝenerala sekretario:

GASTON MOCH.

2.^a Universala Kongreso Esperantista en Genevo

Tuje oni elektas la naciajn riprezentantojn. Kiam oni elektas la hispanujajn sonis la nomoj de niaj amikoj S.^{roj} Guinart, Aya kaj Sabadell kaj poste: *Riprezentanto hatalanuja*: S.^{ro} Pujulá.

Oni legas multajn telegramojn de aliĝo kaj saluto, alsenditaj el ĉiuj partoj de la mondo, inter aliaj el Nova Zelando, Suda Afriko, Tifliso, Vladivostoko k. t. p.

Fine, S.^{ro} Privat, ĝenerala organiza sekretario faras kelkajn avertojn kaj rimarkojn rilate al sia ofico inter la ĉeestantaj aplaŭdoj kaj finiĝas la kunsido.

Acto seguido se procede á nombrar á los representantes de las naciones. Llegó el turno á España y sonaron los nombres de nuestros amigos Sres. Guinart, Aya y Sabadell, y á continuación *representante por Cataluña*, Sr. Pujulá.

Se da lectura á muchos telegramas de adhesión y de saludo remitidos de todos los puntos del globo, entre otros de Nueva Zelanda, Africa del Sur, Tiflis, Vladivostok, etc.

Por fin M. Privat, Secretario general de organizacion, hace algunas advertencias y observaciones relativas á su ramo, en medio de los aplausos de la concurrencia, y se levanta la sesión.

Unu el la avertoj estis ke je la foriro restos tie tiuj, kiuj estis elektitaj delegitoj aŭ riprezentantoj naciaj. La hispanoj, kiuj estis plene mirigitaj aŭdante elekti aparte riprezentanton de Katalanujo, kiel se ĝi ne estu parto de Hispanujo, povis tiam interparoli pri tiu malbona impresio. Ili sin direktis al D.^{ro} Zamenhof simple klarigante la aferon kaj aldonante ke tio estis en Hispanujo afero politika kaj ke pro sia honoro ne povis ĝin konsenti la hispanoj, ĉar ili estus mallaŭdotaj de siaj sampatrujanoj; proponantesamtempe manieron por akordigi ĉion, t. e., nomi S.^{ron} Pujulá ankaŭ riprezentanto de Hispanujo.

Sendube restis konvinkita D.^{ro} Zamenhof pri la graveco de la hispanoj, ĉar ne atendante pli, li eliris el la ĉambro por taŭgaranĝi la aferon. Sed eble S.^{ro} Pujulá, kiu pro la elmontroj disigaj okazintaj en Barcelono forkuris el sia patrujo kaj vivas memvole ekzilita en Parizo, ne akceptis la proponon, ĉar S.^{ro} Ayza estis vokata por atingi interkonsentan solvon.

Fine, post granda diskutado oni decidis, ke la riprezentado estos laŭ lingvoj ne laŭ nacioj, kaj ĉar S.^{ro} Pujulá ne akceptis la kunestadon de S.^{ro} Sabadell en la riprezentado de la katalanoj, tiu ĉi sinjoro eniris en la riprezentadon de la hispana lingvo.

Malaperinte ĉia kaŭzo de malplaĉo, S.^{ro} Gaston Moch, kiel ĝenerala sekretario, legis la nomaron de la *delegitoj ĉiulingvaj*.

SOLENA MALFERMO

Victoria Hall estas la salono difinita por la solena malfermo de la Kongreso. Ĝi ankaŭ sidas en la strato de Generalo Dufour. La lukso de la reĝaj loĝejoj povas doni al ni la plej proksiman ideon pri tiu uzata en la konstruado kaj ornamo de tiu granda domo. Starigita de riĉa anglo por koncertoj kaj muzikaŭdadoj kaj

Una de las advertencias había sido que al tiempo del desfile quedasen allí los que habían sido nombrados delegados ó representantes de las naciones. Los españoles, que no habían salido de su asombro al oír nombrar aparte representante de Cataluña, como si ésta no fuese parte de España, pudieron entonces comunicarse aquella mala impresión. Acudieron al Dr. Zamenhof exponiéndole sencillamente el asunto y añadiendo era una cuestión candente en España de carácter político, y que por su honor no podían consentir los españoles, so pena de recibir las censuras de sus compatriotas, exponiéndole al mismo tiempo la forma de conciliarlo, nombrando al Sr. Pujulá representante también de España.

Convencido debió quedar el doctor Zamenhof de la razón que asistía á los españoles, cuando sin aguardar más salió de la estancia para arreglar el asunto. Sin duda el Sr. Pujulá, que por alharacas separatistas ocurridas en Barcelona tuvo que escapar de su patria viviendo extraño en París, no dió su brazo á torcer cuando fué llamado el Sr. Ayza para conseguir un medio de conciliación.

Finalmente, después de grande debate, se acordó que la representación fuese por idiomas, no por naciones, y no queriendo el Sr. Pujulá, por atribuirse la representación de los catalanes, que figurase juntamente con él el Sr. Sabadell, desistió este último en aras de la concordia de representar á la lengua catalana y formó parte de la delegación de la lengua española.

Desaparecido ya todo motivo de disgusto, el Sr. Gaston Moch, como Secretario general, leyó las candidaturas de los delegados de los *distintos idiomas*.

SOLEMNE APERTURA

Victoria Hall es el salón destinado á la solemne apertura del Congreso. Se halla situado también en la calle del General Dufour. El lujo de la morada de los reyes nos puede dar la idea más aproximada del empleado en la construcción y el ornato de este grandioso edificio. Construido por un ricachón in-

donacita poste al la Ĝeneva urbestro, plie la plej bonajn kondiĉojn por sia celo, ĝi enhavas ĉiujn rilatajn la arton kaj la bonstilon.

Estas la 8 kaj duono vespere. Apud la ĉefa pordo, tra kiu sin ĵetas brilega lumo sur la straton, staras kelkaj scivoluloj, kiuj vidas preterpasi senfinajn vicojn da personoj etikete vestitaj, montantaj multaj el ili sur la brusto la belan stelon verdan.

Se al la 1.000 kaj kelkaj verdaj kartoj oni aldonas la multajn blankajn de la aliĝintoj al Kongreso kaj la 2.000 invitbiletojn, kiuj estis avide petataj de la necesperantistoj sidantaj en Genevo, oni ricevos ideon pri la proksimuma nombro da ĉeestantoj en *Victoria Hall* ĉe la solena malfermo de la Kongreso.

La komitatoj kaj riprezentantoj eniris tra la flanka pordo, por pli facile eniri sur la estradon, kiu restis senhoma ĝis la komenca momento mem. Tie estis longa tablo por la prezidantoj kaj sekretarioj, kun siaj respondaj seĝoj, post kiuj estis du vicoj pli por la komitatoj kaj riprezentantoj, kaj la grandega estrado finis per alta ŝtuparo, kaj funde, apartigita de tiu ĉi per granda kornico, staris belega kaj grandega orgeno. Dekstre kaj apud la prezida tablo, estis alia tablo por la parolantoj.

Ĉe la kortuŝantaj sonoj eltiritaj el la orgeno de delikataj manoj, aperas sur la estrado la simpatia figuro de doktoro Zamenhof, sekvata de la komitatoj kaj delegitoj. En tiu ĉi momento la tuta ĉeestantaro stariĝas kaj freneze aklamas la gloran aŭtoron de Esperanto. Apud la doktoro sidiĝas S.^{roj} Schneeberger, Sebert, Mybs, k. c.; poste la riprezentantoj.

S.^{ro} Schneeberger, kiel prezidanto parolas unue en Esperanto, por saluti la elpensinton de Esperanto, danki la lokan Genevan Komitaton kaj la internacian kaj por diziri bonvenon al ĉiuj kon-

glaŝojn para koncertos ó audiciones y regalado después al municipio de Ginebra, á todas las mejores condiciones para su objeto reúne aquellas que dicen relación al arte y al buen gusto.

Son las ocho y media de la noche. Junto á la puerta principal, que arroja una luz esplendorosa sobre el suelo de la calle, se hallan algunos curiosos que ven pasar interminables cordones de personas vestidas de toda etiqueta, ostentando muchas de ellas en su pecho la hermosa estrella verde.

Si á las 1.000 y tantas tarjetas verdes se añaden las muchas blancas de los adheridos al Congreso, más las 2.000 invitaciones que ávidamente eran solicitadas por los no esperantistas que en Ginebra residían, se tendrá idea del número aproximado de concurrentes en *Victoria Hall* á la solemne apertura del Congreso.

Los miembros del Comité y los representantes entraban por la puerta lateral para tener más cómodo acceso al estrado, que permanecía despejado hasta el momento mismo de empezar. En él había colocada una larga mesa para la presidencia y secretarios, con sus correspondientes sillas, tras éstas dos filas más para el Comité y representantes, terminando aquella inmensa plataforma en una elevada escalinata, y en el fondo, separado de ésta por una gran cornisa, un magnífico órgano de grandes proporciones. A la derecha, y junto á la mesa presidencial, otra mesa para los oradores.

A los sentidos acordes arrancados al órgano por manos muy delicadas aparece en el estrado la simpática figura del doctor Zamenhof, seguido de los miembros del Comité y de los delegados. En este momento todo el público se pone en pie y aclama frenéticamente al glorioso autor del Esperanto. Al lado del Doctor siéntanse los Sres. Schneebeer, Sebert, Mybs, etc.; detrás los representantes.

El Sr. Schneeberger, como presidente, toma el primero la palabra en Esperanto para saludar la presencia del autor del Esperanto, da también las gracias al Comité local de Ginebra y al Comité inter-

gresanoj; li sentas sin feliĉa kaj fiera esti elektita prezidanto de tiu ĉi Kongreso, kiu atingas la simpatian de la tuta ĝeneva loĝantaro. Li prezentas la bonajn deziraĵojn de la Esperantista Svisa Societo kaj deziras la plej plenan sukceson por la dua internacia Kongreso de Esperanto.

Oni donas la vorton al generalo Sebert, kiu france parolas ĉar havas veran intereson, ke lin komprenu la multaj aŭdantoj, kiuj kvankam estas en la salono ne konas Esperanton. Li laŭdas la Svisajn instituciojn, ĝian belan landon, doktoron Zamenhof, dank'al kiu oni eble vidos novan fratan epokon ĉe la popoloj.

S.^{ro} Boirac, rektoro de la Dijona Universitato salutas la esperantistojn el ĉiuj nacioj, rememoras la Bulonjan Kongreson kaj per mallongaj frazoj desegnas la klarecon kaj facilecon de la lingvo internacia. Li salutas la gloran Genevan respublikon, kies historio estas tiel granda, kiel bela.

S.^{ro} E. Bernard, prezidanto de la Grupo Esperantista Geneva, legas leteron de la respektinda Ernesto Naville. Ĉar ni ĝin trovas grandinteresa, ni ĝin konigas al niaj legantoj:

«La peto partopreni en la esperantista Kongreso, kiun faris al ni la organiza komitato, kaŭzis al mi duoblan bedaŭron: ne povi ĉeesti persone en tiu grava kunveno kaj redakti france kelkajn parolojn, kiujn mi plezure estus skribinta en bona Esperanto.

»Jam de multaj jaroj, de tridek almenaŭ, mi estas konvinkita ke la enkonduko de lingvo internacia estas la produkto natura, necesa de l'ĝenerala irado de la civilizacio kaj speciale de la pli kaj pli granda multigado de l'transportaj rimedoj. Al homoj, kies reciproka proksimiĝo ĉiutage fariĝas pli facila, estas ĉiutage pli

nacional, la bienvenida á todos los congresistas, y se llama dichoso y dice que se siente orgulloso de haber sido designado presidente de este Congreso, que puede contar con las simpatías de toda la población ginebrina. Presenta los buenos deseos de la Sociedad esperantista suiza y hace votos por el éxito más completo del segundo Congreso internacional de Esperanto.

Se da la palabra al general Sebert, que se expresa en francés porque tiene interés particular de que le entienda el mucho público que, desconocedor del Esperanto, llena gran parte del salón. Hace el elogio de las instituciones de Suiza, de su hermoso país, de Zamenhof, gracias al cual se verá tal vez lucir una nueva era de fraternidad entre los pueblos.

El Sr. Boirac, rector de la Universidad de Dijon, saluda á los esperantistas de todas las naciones, tiene un recuerdo para el Congreso de Boulogne, y bosqueja en breves frases las cualidades de claridad y sencillez de la lengua internacional. Saluda á la gloriosa república de Ginebra, cuya historia es tan grande como hermosa.

El Sr. E. Bernard, presidente del Grupo esperantista de Ginebra, da lectura á una carta del respetabilísimo Ernesto Naville. Como la conceptuamos de gran interés, la damos á conocer á nuestros lectores:

«La invitación á tomar parte en el Congreso esperantista, que el comité de organización me ha hecho el honor de enviarme, ha causado en mí un doble sentimiento: el no poder asistir personalmente á esa importantísima reunión; el tener que redactar en francés estas frases, que hubiese sido para mí satisfactorio escribir en buen Esperanto.

»Hace muchos años, lo menos treinta, que tengo la convicción de que un idioma internacional es el producto natural y necesario de la marcha general de la civilización, y especialmente de la multiplicación siempre creciente de los medios de transporte. A hombres cuya aproximación se hace de día en día más fácil, es

grave doni rimedon de interkompreniĝo. Tiu ĉi diro havas laŭ mia juĝo certecon preskaŭ egalan je tiu de geometria aksiomo.

»En la epoko, kiam la kreaĵon de D.^{ro} Zamenhof mi ekkonis, mi aŭdis, ke Max Müller estis dirinta tiujn ĉi du opiniojn:

»1.^a La kreo de lingvo internacia multe pli simpla ol la nunaj lingvoj estas saĝa entrepreno.

»2.^a Inter ĉiuj penoj faritaj laŭ tiu direkto, Esperanto meritas la preferon.

»Por certigi ĉu tiu estis tute vera, mi skribis al la ĝlora profesoro de Oxford, kiu afable respondis al mi, ke mi estis bone informita; kaj antaŭ lia morto, li povis doni publikajn pruvojn pri sia aprobo de Esperanto.

»La aŭtoritato de tiel eminenta homo, rigardata kiel unuaranga scienculo en la studado de l'lingvoj, igis min opinii, ke Esperanto povas liveri la solvon de la problemo pri la lingvo internacia. Mi de tiu tempo sekvis kun forta intereso la progresojn rilate tre rapidajn de entrepreno, kies sukceson konstatos kaj pligrandigos la Bulonja Kongreso kaj mi esperas la Geneva.

»Mi do fariĝis esperantisto, kaj tamen mi ne scias Esperanton. Mi ĝin konas sufiĉe por scii kiom simpla ĝi estas kaj facile akirebla; sed mi ĝin ne posedas; mi estas kapabla nek ĝin paroli nek ĝin skribi.

»Feliĉe la direktoroj de la entrepreno, kiu nin kunvenigas, donas la rajton sin nomi esperantistoj al du klasoj de homoj: la personoj, kiuj scias la novan lingvon; ili estas la adeptoj; kaj la personoj, kiuj malhelpataj ĝin lerni pro iaj cirkonstancoj, komprenas la grandan gravecon de la entrepreno, ĝin aprobas kaj faras ĉion eblan por helpi al ĝi; ili estas aprobantoj. Mi metas min en la lastajn, en la klason de la humiluloj kaj, kvankam mi ne scias Esperanton, mi estas fervora esperantisto.

cada día más importante darles el medio de entenderse mutuamente. Esta afirmación tiene para mí una certeza casi igual á la de un axioma de Geometría.

»En la época en que conocí la obra del Dr. Zamenhof, supe que Max Müller había emitido estas dos opiniones:

»1.^a El establecimiento de una lengua internacional, mucho más sencilla que las lenguas actuales, es una empresa razonable.

»2.^a Entre todos los esfuerzos que se han hecho en este sentido, el Esperanto es al cual se debe dar la preferencia.

»Para asegurarme de que esto, efectivamente era así, escribí al ilustre profesor de Oxford, que tuvo la atención de contestarme que había sido yo bien informado, y quien ha podido antes de su muerte dar muestras públicas de su aprobación del Esperanto.

»La autoridad de un hombre tan eminente, considerado como un sabio de primer orden en el estudio de las lenguas, me obligó á admitir que el Esperanto podía ofrecer la solución del problema de la lengua internacional. He seguido desde entonces con vivo interés los progresos relativamente muy rápidos de una causa cuyo éxito pondrán de relieve y aumentarán el Congreso de Boulogne-sur-Mer y el de Ginebra, según espero.

»Me hice, pues, esperantista, y sin embargo no sé el Esperanto. Lo conozco lo necesario para saber cuán sencillo es y cuán fácil su adquisición, pero no lo poseo. No podría ni hablarlo ni escribirlo.

»Felizmente hay dos clases de personas á quienes los directores de la obra que os reúne dan el derecho de llamarse esperantistas. Los que saben la nueva lengua: estos son los adeptos; y los que no pudiendo aprenderlo por circunstancias personales, comprenden toda la importancia de la empresa, la aprueban, y hacen todo lo que pueden para favorecerla; éstos son los aprobadores. Yo me cuento en el número de estos últimos, en la clase de los humildes, y sin saber Esperanto soy un esperantista celoso.

»Sed (eble vi demandas min) kial mi ne faras la necesan penon por pasi de la klero de la aprobantoj en tiun de ia adepto? Kial, mi tuj diros al vi:

»Mi estis instigita de diversaj motivoj aldoni al la lernado de mia patra lingvo, la lernadon de kvin aliaj lingvoj (latina, greka, hebrea, germana kaj itala). Tiujn lingvojn, dum la daŭrado de mia longa vivo, mi ĝenerale forgesis, ĉar devinte tro multajn lerni, mi ne plene estis ilin lerninta. Sed nun, kiam mi estas tre baldaŭ finonta mian 90.^{an} jaron, mia maljuna kapo lacigita apenaŭ sufiĉas, kaj iafoje ne sufiĉas por la plenumo de miaj plej pozitivaj devoj.

»Mi do ne sentas en mi nek la rajton, nek la povon aldoni sepan lingvon, kiel ajn facila ĝi estas, al la ses aliaj, kun kiuj mi iom konatiĝis.

»Sed jen tio, kion mi povas diri al ĉiuj personoj kapablaj ĝin fari: «Informiĝu pri la naturo de Esperanto kaj pri ĝiaj progresoj, kaj se vi atingos la saman konkludon kiel mi, lernu tiun lingvon kaj admonu ĉiujn, ke ili ĝin lernu: vi tiel laboros en granda kaj bona faraĵo.»

»Se, ian tagon, oni povus diri ke, flanke de la naciaj lingvoj, kiuj daŭrigos sian malvolviĝadon naturan, ekzistas unu rimedo de komunikado inter la loĝantoj de la terglobo, unu *homara* lingvo, tiu tago estos unu el la grandaj datoj de la historio.»

Tiu letero estis akceptata per longa aplaŭdado, kiu poste resonis, kiam sinjoro Privat ĝin tradukis esperanten.

Tuj la Doktoro levigas por fari sian paroladon. (*Granda aplaŭdado.*)

(*Daŭrigota.*)

»Mas (podréis preguntar), ¿por qué no hago yo el esfuerzo necesario para pasar de la clase de los aprobadores á la de los adeptos? Voy á deciros el por qué.

»Por diversidad de razones fuí llevado á unir al estudio de mi lengua maternal el estudio de otras cinco lenguas (latín, griego, hebreo, alemán é italiano.) Estas lenguas, en general, en el curso de mi larga carrera, las he dado al olvido, porque teniendo mucho que aprender, las aprendí de una manera incompleta. Ahora, cuando ya estoy á punto de cumplir mis 90 años, mi decrepita cabeza apenas es suficiente y á veces del todo insuficiente para cumplir mis obligaciones más positivas.

»Yo no me siento ni con derecho ni con poder de unir una séptima lengua, por fácil que sea, á las seis con las cuales hice algún conocimiento.

»Mas he aquí lo que yo puedo decir á todas las personas que quieran ponerlo en práctica: Informaos de la naturaleza del Esperanto y de sus progresos, y si llegáis á las mismas convicciones que yo, estudiadlo é inducid á los demás á que lo estudien. Así colaboraréis en una obra grande y buena.

»Si un día se pudiese decir que al lado de las lenguas nacionales, que continuarán su desarrollo natural, existe un medio de comunicación entre todos los habitantes del globo, una *lengua de la humanidad*, aquel día sería una de las grandes fechas de la historia.»

Esta carta fué acogida con grandes aplausos, que se repitieron después que el Sr. Privat la tradujo al Esperanto.

Acto seguido el Doctor se levanta para hablar. (*Grandes aplausos.*)

(*Continuará.*)

Sciigoj

Ni sendas nian kondolencon al la familio de S.^{ro} Leopoldo Barrios, staba kolonelo kiu ĵus mortis en Málaga, kaj kiu estis nia samideano.

Alĝerujo.—La «Algeria Stelo» diris en sia septembra numero, ke ĝi sentis sin devigata ĉesi la publikigadon, pro manko da monaj rimedoj. Ni bedaŭras la malaperon de tiu estimata kolego.

Ameriko.—La gravaj ĵurnaloj «Chicago Chronicle», «Philadelphia Nort Amerikan», «Boston Post» kaj «Seattle Daily News» publikigas senintermanke artikolojn favorajn al Esperanto.

«La Amerika Esperantisto» estas nova esperanta ĵurnalo, ĵus aperinta, en Oklahoma City (U. S. A.). Ĝi enhavas elementojn pri gramatiko kaj vortaro, kun ekzercoj, de nia lingvo. Ni esperas ke tiu-ĉi publikaĵo kunhelpos la progreson de Esperanto en Nord-Ameriko, kaj ni kore akceptas ĝin en nia intertrakto kaj korespondado.

Aŭstralio.—Ĉiusemajne enpresas «Brisbane Observer», ĵurnalo de tiu malproksima lando, aron da lecionoj, tradukojn kaj sciigojn pri Esperanto. Ankaŭ la redaktoro de «Australian Review of Reviews» estas arda partiano de nia lingvo, kiun li senĉese propagandas.

Anglujo.—La liverpool'aj esperantistoj, estas funebritaj, kaŭze la drono de D.^{ro} Lloyd en riveron de Rhone, dum sia ĉeestado tie kiam li promenadis sur ĝiaj bordoj, la tagojn de la Geneva Kongreso. Al lia familio kaj amikoj, nian partoprenon en la malĝojo.

La internacia Kongreso de oficistoj en Londono, decidis unuvoĉe ke Esperanto estu akceptata, kiel oficiala lingvo, en ĉiuj estontaj internaciaj kongresoj,

Enviamos nuesta pésame á la familia del Sr. D. Leopoldo Barrios, coronel de Estado Mayor, que ha fallecido en Málaga, y era esperantista.

Argelia.—La «Estrella de Argel» diĵo en su número de Septiembre que se sentía obligado, á cesar en su publicación por falta de recursos pecuniarios. Lamentamos la desaparición de aquel estimado colega.

América.—Los importantes periódicos «Chicago Chronicle», «Philadelphia Nort American», «Boston Post» y «Scattle Daily News» publican continuamente artículos favorables al Esperanto.

«El Esperantista de América» es un nuevo periódico de Esperanto que acaba de aparecer en la ciudad Oklahoma (Estados Unidos de América). Contiene elementos de gramática y diccionario, con ejercicios, de nuestra lengua. Esperamos que esta publicación cooperará al progreso del Esperanto en la América del Norte, y cordialmente lo recibimos en nuestra comunicación y correspondencia.

Australia.—Semanalmente imprime «Brisbane Observer», periódico de aquel lejano país, una serie de lecciones, traducciones y noticias sobre el Esperanto. También el redactor de «Australian Review of Reviews» es ardiente partidario de nuestra lengua, que propaga incesantemente.

Inglaterro.—Los esperantistas de Liverpool están de duelo por haberse ahogado el Dr. Lloyd en un río de Rhone, durante su estancia allí, cuando paseaba por sus orillas, en los días del Congreso de Ginebra. A su familia y amigos nuestra participación en la tristeza.

El congreso internacional de empleados en Londres decidió por unanimidad que el Esperanto sea aceptado como lengua oficial en todos los futuros congre-

kaj instigi la Registrarojn por ĝia instruado en la unu-kaj dua-gradaj lernejoj.

Interesan sciigon raportas «Daily News». Kosmopolita aŭdantaro kunvenis en la Polyglot klubo de Londono, kie S.^{ro} Cesare Cucchi devis diri, uzante la italan lingvon, paroladon pri la religia sento en la vivado kaj arto de la nacioj: do, li ŝanĝis la nomitan lingvon per Esperanto, kaj bonege estis komprenata, kaj sukcesis. Tio pravas la disvastiĝo de Esperanto en la angla ĉefurbo.

Belgujo.—La Ministro de Instruado intencas enkonduki Esperanton en lernejoj.

Brazilujo.—En Campinas kaj Porto Alegre fondiĝis esperantistaj grupoj.

Ĉilio.—En Santiago tri kursojn de Esperanto oni klarigas nune.

Danujo.—Formiĝis grupo en Kopenhago.

Franujo.—En la Geneva ekspozicio oni multe rimarkis la unuan jarkolekton binditan de la bela gazeto «Tra la Mondo», kiu la aŭgusta numero komencis kaj sekvis ĝis la oktobra, amuzigan kaj interesan noveleto de nia sampatrujano S.^{ro} Johano Muñoz Pabon, esperantigita de S.^{ro} Johano Garcia Martín.

«L'Esperantiste» raportas detale kaj ĝuste, kun plena informado, la sukcesojn de la Kongreso, kaj la aferojn pritraktitajn en tiu grava internacia kunveno, estante speciale interesa la letero de naŭdekjara kaj klera filozofo S.^{ro} Ernesto Naville pri sia konatiĝo kun Esperanto.

Laŭ la deziro de la Geneva Kongreso la «Amikaro Esperantista», kies anoj apartenas al ĉiuj branĉoj de l'komerco, industrio, artoj, instruado k. t. p. kaj sekve estas tute kapabla doni pri tiuj aferoj la plej precizajn sciigojn ĵus fondiĝis Esperantan Konsulejon en Lyon'o.

sos internacionales, y excitar á los Gobiernos para su enseñanza en las escuelas de primeras y segundas letras.

Interesante noticia refiere «Daily News». Un auditorio cosmopolita se había reunido en el Club políglota de Londres, donde D. César Cucchi debía pronunciar un discurso, usando la lengua italiana, sobre el sentimiento religioso en la vida y en el arte de las naciones. Pues bien: cambió la nombrada lengua por el Esperanto, y fué comprendido y obtuvo éxito. Lo que prueba el desarrollo del Esperanto en la capital de Inglaterra.

Bélgica.—El ministro de Instrucción intenta introducir el Esperanto en las escuelas.

Brasil.—En Campinas y Porto Alegre se han fundado grupos esperantistas.

Chile.—En Santiago se explican tres cursos de Esperanto actualmente.

Dinamarca.—Se ha formado un grupo en Copenhague.

Francia.—En la exposición de Ginebra se observó mucho la colección del primer año, encuadrada, de la hermosa revista «A través del Mundo», que en el número de Agosto comenzó, y ha seguido hasta el de Octubre, una divertida é interesante novelita de nuestro compatriota D. Juan Muñoz Pabón, vertida al Esperanto por D. Juan Garcia Martín.

El esperantista relata, detallada y exactamente, con información completa, los sucesos del Congreso y los asuntos tratados en aquella importante reunión internacional, siendo en especial interesante la carta del nonagenario y esclarecido filósofo D. Ernesto Naville sobre su conocimiento con el Esperanto.

Según el deseo del congreso de Ginebra, la «Amistad Esperantista», cuyos miembros pertenecen á todos los ramos del comercio, de la industria, artes, instrucción, etc., y por consiguiente están en condiciones de dar en estas materias las más exactas noticias, acaba de fundar un Consulado Esperantista en Lyon.

Ĝi elektis Konsulojn: S.^{ino} F. Servet, strato Garibaldi 45, poste strato Sentier, 10.—S.^{ro} F. Drudin, strato Trousset 107.—S.^{ro} E. Vincent, strato Paul Bert 3.—S.^{ro} G. Pouchot, strato Martinière 7.

Tiuj Konsuloj donos tre volonte kaj kiel eble plej akurate ĉiujn petitajn sciiĝojn.

Germanujo.—Esperanto multe progresas en tiu-ĉi nacio. 482 estas la nombro de nunaj lernantoj de nia lingvo en la grava urbo Dresde, kaj 400 tiuj de la volumoj el kiu konsistas la bibliotekon de ĝia grupo.

Leipzig havas hodiaŭ tri grupojn.

Nova grupo fondiĝis en Bremen.

Berlino kaj Frankfurta. M. sentis sin honoratajn per la vizito de D.^{ro} Zamenhof.

Rezultato de parolado kiun faris profesoro O. Simon pri «Lingvo internacia en instruado kaj komerco», estis fondiĝo de sekcio de la Reichenberga Grupo en Tetschen. Tiu grupo ricevis la Oran premion en la german-bohema ekspozicio, per sia fako esperanta.

Fine en Brunsvigo formiĝis esperanta komerca societo kun 200 anoj kaj la aliĝo de la «Kaufmanischer Verein» kiu konsistas el 17.000 membroj.

Polujo.—Kun granda plezuro ni salutas la aperon de «Pola esperantisto», bonega kolego kiu naskiĝis en la patrujo de la aŭtoro de Esperanto; kaj ni bedaŭras ne esti povinte fari tion antaŭ per la nericevo de la unua numero. Ĝi estas bela publikaĵo, en sia enhavo kaj presformo, bone informita, kaj lerte verkita. Korajn sentojn de amikeco kaj estimo, ni sendas al la distinginda kolego, kun deziro de longa kaj feliĉa ekzistado.

Hispanujo.—En *Bilbao*. Laŭ raportas nia fervora propagandisto S.^{ro} R. Unzaga la afero esperanta daŭre kaj prospere tre kreskas. Post klopodoj iom fruktigaj de la

Ha elegido cónsules á éstos: Señora F. Servet, calle de Garibaldi, 47; después calle de Sentier, 10.—Sr. F. Drudin, calle de Tronchet, 107.—Sr. E. Vincent, calle de Paul Bert, 3.—Sr. G. Puchot, calle de la Martinière, 7.

Estos cónsules darán con sumo gusto, y lo más pronto posible, las noticias que se les pida.

Alemania.—El Esperanto progresa mucho en esta nación; 482 es el número de los que actualmente aprenden nuestra lengua en la importante ciudad de Dresde, y 400 el de los volúmenes de que consta la biblioteca de su grupo.

Leipzig tiene hoy tres grupos.

Nuevo grupo se ha fundado en Bremen.

Berlín y Francfort a. M. se sintieron honrados con la visita del Dr. Zamenhof.

Resultado del discurso que hizo el profesor O. Simón sobre «La lengua internacional en la enseñanza y en el comercio», fué la fundación de una sección del grupo de Reichenberg, en Tetschen. Dicho grupo recibió medalla de oro en la exposición alemana bohemia por su sección de Esperanto.

Finalmente, en Brunswick se ha formado una sociedad de comercio en Esperanto, con 200 miembros, y la adhesión de la «Kaufmanischer Verein», que comprende 17.000 miembros.

Polonia.—Con gran placer saludamos la aparición de «El esperantista polaco», excelente colega que ha nacido en la patria del autor del Esperanto. Es una hermosa publicación por su contenido y por su forma tipográfica, bien informada y correctamente escrita. Cordiales sentimientos de amistad y estimación enviamos al distinguido colega, con deseo de larga y feliz existencia.

España.—En *Bilbao*, según nos refiere nuestro fervoroso propagandista D. R. Unzaga, el Esperanto crece continua y prósperamente. Después de los

Grupo. jam elvekinta feliĉe ĝeneralan bonakcepton por l'ideo en la urbo kaj ankaŭ ekster ĝi, okazis neatendite rimarkinda favormovo inter urba klerularo tial, ke patronano de hispanaj esperantistoj, eminenta S.^{ro} Torres Quevedo, publike kuraĝigis, aplaŭdegante varme ĉe sciencula festeno, nian helpindan entreprenon kaj ĝiajn probatalantojn, Tiu nia eltalentiga samideano estis dum ia tempodaŭro la plej grava ĉefpersono ĉirkaŭ tie ĉi pro tio, ke li plensukcese eksperimentis en somerurbeto apud Bilbao kaj antaŭ sciivola saĝamaro, sian elpensajon nomatan *Telekino* kaj kies funkciado bazita sur fundamento de senfadena telegrafo ebligas regi de malproksime sen ia materiala perilo kaj nur per elektronĵoj iun ajn objekton surhavanta similan aparataron ricevontan la Hertzajn ondojn, laŭ li ĝin konstatis kaj konvinke elmontris turnante de tero ĉien kaj gvidante tra multenombraj barketoj kusantaj en rado, personliberan boaton kun nura masto kaj ilaro kaj kiu manovrigis precizege obeante la deziron de ĝia lerta reganto.

Por testi tiun kontentigan rezultaton pli ol dudek inĝenieroj decidis prezenti al tiu elpensinto honorigan festenon kie oni parolis precipe pri nia kara lingvo ĝin laŭdegante kaj konsilante ĝian studadon al ĉiuj personoj, laŭ raportis sekvantan tagon la tuta gazetaro. Tio sendube efikis multe ĉar tuj post kelkaj tagoj, ĉe unu el la plej gravaj privataj kolegioj, oni decidis mafermi esperantan fakon, kies ekzemplon imitis la urba Leĝosciencia Akademio anoncante ke baldaŭe oni ekinstruos ĉe ĝi la lingvon Esperanto.

Aliaj apartaj favorsignoj same aperis diversloke, pro kio, vidante nuntempe ĉion tion ĉi kaj ĝin komparante kun la stato de la propagando antaŭ fondiĝo de l'Grupo, oni rajtas eldiri laŭte kaj kun

trabajos algo fructíferos del Grupo, habiendo alcanzado felizmente una buena acogida para la idea en la ciudad y fuera de ella, inesperadamente ha tenido lugar un notable movimiento á favor entre la gente instruída de la ciudad; porque uno de los patronos del Esperanto en España, el eminente Sr. Torres Quevedo, se atrevió públicamente á aplaudir con calor en un banquete de sabios nuestra recomendable empresa y á sus principales corifeos. Este talentazo, seguidor de nuestra idea, ha sido durante algún tiempo la persona más importante en estos alrededores, por la razón de que en un pueblucillo cerca de Bilbao y en presencia de curiosos eruditos, ha hecho con brillantísimo éxito ensayos sobre su invento llamado *Telequino*, y cuyo funcionamiento, basado en la telegrafía sin hilos, permite gobernar desde lejos, sin ningún intermedio material, y sólo con las ondas eléctricas, cualquier objeto que lleve un aparato semejante para recibir las ondas de Hertz, como él lo hizo constar y lo demostró hasta la convicción, dirigiéndose desde tierra á todas partes, y guiando, á través de muchas barquillas que había en la rada, un bote vacío de personas sólo con el mástil y el aparato, al cual hizo maniobrar con precisión obedeciendo al deseo de su experimentado guía.

Para celebrar este resultado satisfactorio, más de veinte ingenieros decidieron ofrecer al autor un banquete honorífico, en el cual se habló principalmente de nuestra querida lengua, encomiándola y aconsejando su estudio, según relataron al día siguiente todos los periódicos. Esto, sin duda, produjo su efecto, pues algunos días después, en uno de los más importantes colegios privados se tomó la Academia de Jurisprudencia, anunciando que pronto comenzaría en ella la enseñanza de la lengua Esperanto.

Otras diferentes notas de fervor aparecieron en diversos lugares, por lo cual, viendo ahora todo esto y comparándolo con el estado de propaganda antes del acuerdo de abrir una sección de Espe-

plena memkonfido ke en Bilbao Esperanto jam eniris serioze la vojon ĝin alkondukantan nepre al definitiva triumfo.

Orense.—La 4.^{an} de tiu ĉi monato estis malfermata kurso de Esperanto en la Asocio de komercaj faktoroj; ĝi okazos ĉiu dimanĉe de la 11.^a ĝis la 12.^a horo,

En *Coruña* ankaŭ malfermis kurson S.^{ro} Monteagudo.

En *Santiago* (Coruña) estis ĵus malfermata kurso de Esperanto senpage en la Normala Lernejo. La nombro de la lernantoj estas grandega.

Santa Cruz de Tenerife (Canarias).—Multe tie ĉi laboradas pri Esperanta propagando S.^{ro} Rivero, kiu anoncas al ni ke baldaŭ estos fondata Esperantista Grupo. Ni tre ĝoje aplaudas la agadon de la dirita sinjoro en la plej malproksima el niaj provincoj.

Castellón.—La direkta komitato de la Grupo esperantista de tiu ĉi urbo estas laŭ jene:

Honoraj prezidantoj, D.^{ro} Zamenhof kaj S.^{ro} Codorniu; efektiva prezidanto, S.^{ro} Josefo Seijas; vicprezidanto, S.^{ro} Lucas Izquierdo; sekretario kaj bibliotekisto, S.^{ro} Viktorino Aparici; vicsekretario kaj kasisto, S.^{ro} Josefo Salvador Ferrer; voĉdonantoj, S.^{roj} Clemente Gualart, Ramiro Castelló, Ramón Almazán kaj Carlos Selma.

Nian plej koran gratulon.

S.^{ro} Ayza faris ekskurson al *Benikarlo* kaj *Vinaroz* kie li faris paroladojn certe tre fruktodonajn, ĉar li trafis naskigi la du novaj Grupoj esperantistoj de Vinaroz y Benikarló (Castellón).

Alcalá de Chivert (Castellón).—Post du paroladoj faritaj de nia karega amiko S.^{ro} Andreo Piñó, oni fondis Grupon esperantistan kies direkta komitato estas:

Prezidanto, S.^{ro} Pastro Rosendo Cucala Martí; vicprezidanto, S.^{ro} Cándido Beltrí Cid; bibliotekisto kaj kasisto, S.^{ro} Ezequiel Tortajada Cardete; sekretario, S.^{ro} Julio Payá Ebrí; vicsekretario, S.^{ro} Emilio Cucala Amella; voĉdonantoj, S.^{ino} Mercedes López Alcaide kaj S.^{ro} Joaquín Puig Albert.

Ĵurnaloj kiuj okupis sin pri Esperanto:

«La Gaceta del Norte», Bilbao; artikolo de S.^{ro} Unzaga. «Pueblo Católico», Jaén. «El Correo de Galicia», Santiago (Coruña). «La Alborada», Alcalá de Chivert. «El

ranto; ejemplo que imitó la fundación del Grupo, da derecho á decir alto y con entera confianza que en Bilbao el Esperanto ha entrado ya en el camino que le conduce con seguridad al triunfo definitivo.

Orense.—El día 4 de este mes se abrió un curso de Esperanto en la Asociación de Dependientes de comercio; tendrá lugar todos los domingos de once á doce.

En *Coruña* también se ha abierto un curso por el Sr. Monteagudo.

En *Santiago* (Coruña) acaba de abrirse un curso gratuito de Esperanto en la Escuela Normal. El número de los alumnos es grandísimo.

Santa Cruz de Tenerife (Canarias).—Mucho trabaja aquí en la propaganda del Esperanto el Sr. E. G. Rivero, quien nos anuncia que pronto será fundado un Grupo esperantista. Con mucha alegría aplaudimos la labor del citado señor en la más lejana de nuestras provincias.


Castellón.—La Junta Directiva del Grupo esperantista de esta ciudad es como sigue:

Nuestra más cordial felicitación.

El Sr. Ayza ha hecho una excursión á *Benikarló* y *Vinaroz*, donde dió conferencias, por cierto muy fructíferas, pues ha conseguido que nacieran los dos nuevos Grupos de Vinaroz y Benikarló (Castellón).

Alcalá de Chivert (Castellón).—Después de dos discursos pronunciados por nuestro íntimo amigo D. Andrés Piñó, se ha fundado un Grupo esperantista, cuya Junta Directiva es:

Trabajo», de Sabadell. «El Restaurador», Vigo; art. de S.^{ro} Dovaog Nogueira. «Revista Gallega», Coruña; art. de F.^{ino} María Barbeito Cerviño. «Correo Catalan», Ferrol; art.^{oj} de S.^{roj} Juan Beltrán kaj M. Monteagudo. «A B C», Madrid; art. de S.^{ro} Monteagudo. «Faro de Vigo»; art. de S.^{roj} Ariño kaj Dovaog Nogueira. «Museo Exposición», Alicante; art. de S.^{ro} Codorniu. «Gaceta de Galicia», Santiago; art. de S.^{ro} Carro García. «La Lectura Dominical».



Bibliografio

Delmas'aj Helpaj Bildoj por la praktika instruado de l'modernaj lingvoj per bildaro kaj senpera metodo.

Ni tufkore dankas S.^{ron} Delmas, kiu tre afable sendis du specimenajn ekzemple-rojn de la esperanta eldono de tiu ĉi praktika kaj utiliga verko, tre ŝatata en la profesorado de la modernaj lingvoj tiel ĉe Francujo, kiel ĉe la aliaj landoj.

La verko konsistas el serio da helpaj bildoj (koloraj se estas muraj kaj presnigraj se estas kunportebblaj) en kiuj la desegnisto penis doni al ĉiu persono kaj al ĉiu objekto perfektan distingeblecon, ebligante per ĝia formato al ĉiuj lernantoj, sekvi sen laceco la parolatan lecionon de la profesoro. Ankaŭ estas klariga libreto, necesega pleningo de la bildoj; ĝi montras al la instruisto la tutan utilon, kiun li povas eltiri el la helpaj bildoj, kaj krom tio, ĝi estas aranĝitaj tiamaniere, ke la komencantaj lernantoj povas, dum la unuaj lecionoj, uzi ĝin kiel tre simplan legolibron.

Jen la prezoj de tiu utiliga verko:

Kunportebbla eldono (20×29)

1.^a kajero (N.^{oj} 1 ĝis 6) 2 fr. | 2.^a kajero (N.^{oj} 7 ĝis 16) 3 fr.

Muraj bildoj koloraj (90×120)

Unu aparta bildo. 4'60 fr. | Dua kaj tria serio (N.^{oj} 7 ĝis 16) 41 fr.
Unua serio (N.^{oj} 1 ĝis 7). 45'60 » | Plena kolekto (N.^{oj} 1 ĝis 16) 61'60 fr.

La klariga libreto esperanta, de S.^{ro} L. de Beaufront, prezidanto de la F. S. p. p. E. 1'25 fr.

Ankaŭ estas aliaj specialaj eldonoj por helpi la lernadon de la lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala, rusa kaj flandra.

Oni sin turnu al firmo Bailly-Baillere & hijos, plaza de Santa Ana, 10, *Madrid*.

Universala Vortaro de la lingvo internacia Esperanto, de L. L. Zamenhof.—Prezo, 1 franko.

Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto, de L. L. Zamenhof.—Prezo, 0'75 fr.

Fundamento de Esperanto (gramatiko, ekzercaro, universala vortaro), de L. L. Zamenhof.—Prezo, 2 fr.

Ni anoncas la novajn eldonojn de tiuj ĉi tre konataj verkoj de nia Majstro kaj kiuj rajte devas kuŝi en la biblioteko de ĉiu bona esperantista.

Ilin oni povas mendi al firmo Hachette et K.^o—Parizo.

La Evangelio Sankta Mateo, laŭ D.^{ro} Martin Luther, tradukita en la lingvon internacian Esperanto, de W. B. Mielck kaj Fr. Stephan kun antaŭparolo de Lic. D.^{ro} Alfred Jeremias.—Prezo, 50 pfenigoj. Ricevebla de Esperanto Verlag Moller kaj Borel. Prinzenstrasse 95, Berlin.

Nur laŭdojn meritas la korekta traduko farita de niaj samideanoj Mielck kaj Stephan ĉar krom la graveco alporti al la esperanta biblioteko novajn verkojn, la tradukoj de iaj ajn religiaj verkoj estas tre bonaj iloj por la disvastigo de nia lingvo.

La Ŝlosiloj Ĉefeĉaj.—Kiel kuriozaĵo ni publikigas la statistikan tabelon montrantan, kien iris la unuaj 100.000 ŝlosiloj.

	Angl.	Germ.	Franc.	Ital.	Sved.	Hisp.	
Austrio-Hungarujo	50	600	50	50	50	50	850
Belgujo	50	450	500	50	50	50	1.150
Finlando	200	250	200	200	2.400	200	3.450
Francujo	2.200	1.600	14.200	800	350	350	19.500
Germanujo	1 200	12.300	2.000	350	300	300	16.450
Granda Britujo	35.000	2.600	3.500	1.250	900	600	43.850
Hispanujo	100	50	50	50	50	1.500	1.750
Italujo	300	50	50	1.200	50	—	1.400
Rusujo	50	100	50	100	100	100	350
Svedujo	50	250	200	100	2.600	100	3.550
Svisujo	100	400	1.750	50	50	50	2.400
Unuigitaj Ŝtatoj	3.400	550	650	300	100	100	5.100
	42.700	19.20	23.200	4.500	7.000	3.400	100.000

La hispana eldono apenaŭ estis aperinta jam bezonis novan eldonon. Antaŭ ne-longe oni sendis 10.000 ekzemplerojn de la hispana eldono al unu sola mendinto.

Tiu ĉi tabelo montras la vendon nur ĝis la fino de Februaro. De tiam ĝis Julio la nombro de la ŝlosiloj venditaj preskaŭ duobliĝis.

Sub la titolo (nacie tradukita) *LA LINGVO ESPERANTO kaj rimedo por ĝin lerni sen lecionoj, legante malgrandan historion*, presigis S.^{ro} Ĉefeĉ novajn broŝuretojn kiuj enhavas la saman tekstojn de la konataj ŝlosiloj kaj plie la tradukon de la Andersen'a fabela *La malbela anasido* kun klarigaj rimarkoj kaj pri la gramatikaj reguloj.

Jam estas eldonitaj la franca kaj angla eldonoj kaj la kosto de ĉiu ekzemplero estas 10 centimoj; 100 ekzempleroj 7 frankojn.

Oni sin turnu al la eldonisto E. Ĉefeĉ, 45 Christchurch Road, Streatham, London, S. W.

Tra Berna Oberlando, mallonga ilustrita gvidlibro al memoro de la 2.^a internacia kongreso de la Esperantistoj en Genevo. Verkita de Th Hopf, apotekisto en Adelboden, presita kaj eldonita de Oscar Hopf, svisa esperanta eldonejo en Thun.

Tre bele presita kaj multilustrata gvidlibreto, kiu por la ĉeestintoj al la Geneva Kongreso taŭgos kiel kurioza memorajeto kaj ankaŭ por la ceteraj esperantistoj ĝi servos kiel legolibro interesa kaj amuza montranta vidaĵojn de tiu belega lando kun kelkaj notoj historiaj tre korekte verkitaj.

L'Héritage Klodarec, unuakta komedio prezentita en Centra Esperantista Oficejo la 28.^{an} Aprilo 1906^a Mendebila ĉe firmo Hachette kaj K.^o Parizo.—Prezo, 0,75 fr.

Tiu ĉi bela kaj amuza komedio france verkita de S.^{ro} F. de Ménéil estis akceptata de niaj francaj samideanoj kun aplaŭdo. Nacilingven tradukita ĝi ni kredas atingos la saman sukceson kaj povas esti tre utila por la disvastigo de Esperanto tial ke ĝi pravas ke nia helpa lingvo estas la plej bona ilo por interkompreniĝo inter diversaj malsamnacionoj.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto de Hermann Jurgensen u. M. Pagnier sub la redakcio de D.^{ro} Zamenhof. Recevebla de Esperanto Verlag Moller kaj Borel. Prinzenstrasse 95, Berlin.—Prezo de la vortaro germana-esperanta 2 mk.; en eleganta tola bindaĵo 2'50 mk.

Por rimarkigi la gravecon de tiu vortaro ni nur kopias ĝian antaŭparolon subskribitan de D.^{ro} L. L. Zamenhof. Jen estas:

«Antaŭparolo al la dua eldono.—Respondo al multaj demandantoj.—Pri ĉiuj vortoj, kiuj ne estas troveblaj en la verko «Fundamento de Esperanto» devas decidi la Esperantistoj mem (kion eble kun helpo de la «Lingvo Komitato» elektita en la Bulonja Kongreso). Sed se oni deziras scii, kian tradukon *mi persone* rekomendus por tiu aŭ alia vorto, kaj la ekzistantaj vortaroj en aliaj lingvoj ne donas klarigon pri tio ĉi, aŭ se ekzistas ia reciproka malkonsento inter la traduko de la sama vorto en diversaj vortaroj kaj oni deziras scii, kiun formon mi persone rekomendas elekti—mi konsilas (ĝis la «Lingva Komitato» donos alian decidon) serĉi en la vortaroj kaj germana-esperanta eldonitaj de la firmo Esperanto Verlag Moller kaj Borel, ĉar tiuj ĉi vortaroj estas redaktataj de mi mem.—L. L. Zamenhof.»

Verba amuzajo, verkita de esperantisto n.^o 10.072.—Prezo: 10 centimoj.

Nia respektinda kaj agema samideano S.^{ro} Aŭgusto Jimenez Loira verkis belan kaj amuzan broŝureton, kiu montras la uzon korektan de ĉia verba finaĵo sub formo klara kaj interesa. Ĉar ĝi prezentas la originalan tekston hispanan kaj apude la esperantan tradukon ĝi bone taŭgas por la lernantoj de nia lingvo. Kvankam multaj ekzempleroj jam estas venditaj ni deziras al tiu uilega verko plej bonan sukceson kaj multajn eldonojn.

Mendu la broŝurojn al la aŭtoro, strato Paz, 20, Valencia.

* * *

Ni ricevis el la firmo Hachete kaj K.^o dudek kvin belajn foliojn kun koloraj bildoj klarigantaj amuzajn historietojn. Ni dankas la firmon Hachete pro la sendo de tiu belaj verketoj.

R. Duyos.

Esperanto en la militistaro

Je la fino de Julio 1907 okazos en Londono la venonta konferenco internacia de Ruĝa Kruco. Tre kredeble la propono pri enkonduko de Esperanto en la servojn de la Ruĝa Kruco estos prezentata. Do urĝe estus ke ĉiuj ni uzu nian influon por propagandi ĉe la naciaj societoj de Ruĝa Kruco.

Ĉiuj esperantistoj izolaj aŭ grupaj estas petataj, ke ili bonvolu sendi al la jena adreso:

Leŭtenanto Bayol, instruitoro ĉe la speciala militista lernejo Saint-Cyr (S. et O.) Franca—la nomaron laŭlande de ĉiuj esperantistoj kiuj milittempe:

1. Ricevos flegojn (ĉiurangaj militistoj de armeoj aktivaj, rezervoj k. t. p.).
2. Flegos la malsanulojn kaj vunditojn (kuracistoj, hirurgiistoj, farmaciistoj, flegistoj, portistoj, religiistoj. Sinjorino de la Ruĝa Kruco k. t. p.).

Skribi nomojn, funkciadojn dum militiro, adreson.

Tiuj sciigoj estos tre utilaj por trafi nian celon: akceptigi Esperanton je la Kongreso de la Ruĝa Kruco 1907

Al ĉiuj militistoj samideanoj.

Kapitano Baff, 62, Providence Str. Worcester, Mass., Unuigitaj Statoj de la Norda

Amerikoj faras gravan raporton al sia Militministro por enkonduki Esperanton ĉe la militaj lernejoj West-Point kaj Washington, kaj la marista lernejo de Annapolis. Li petas, ke ĉiuj samideanoj sendu al li kiel eble plej multe da sciigoj vidpunkte de armeo kaj maristaro.

NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

Santa Cruz de Tenerife (Canarias): 540, Antonio Secuona Hardisson; 541, José Sicilia González; 542, José Fernaud Ortega; 543, Rafael Costa Izquierdo; 544, José Miranda Pulido; 545, Juan Cambreleng; 546, Guillermo Me Kay; 547, Vicente Pérez Bodría; 548, Manuel Barreto Marrero; 549, Antonio González; 550, Nicolás Perera García; 551, Federico F. Trujillo. — *Vigo* (Pontevedra): 552, José Perea Lozano; 553, Juan Almazán Fouz; 554, Francisco Lago León. — *Tafalla* (Navarra): 556, Teodoro Iriarte; 557, Joaquín Perdices; 558, José Resino. — *Palma* (Baleares): 559, Bartolomé Font. — *Teulada* (Alicante): 560, José Muñoz Landete. — *Castellón*: 561, Lucas Izquierdo Arias. — *Aguilas* (Murcia): 562, Alfredo Ceruelo. — *Medina del Campo*: (Valladolid): 563, Francisco Román; 564, Jacinto Holguín Deza; 565, Luis Díez Sangrador. — *Vigo*: 566, Castor Castiñeira Gil. — *Montblanch* (Tarragona): 567, Fr. Buenaventura Sancho Puente. — *Valencia*: 568, Lorenzo Arroyo Franch; 569, Diego Sarrío Tamarit; 570, Ramón Martí Garcerá; 571, Francisco Peña Martínez; 572, Salvador Salcedo Ferrer; 573, Juan Galvañ Rams; 574, Emilio Carbonero Nadal; 575, Julio Hernández Bau; 576, Manuel Costell Monforte; 577, Antonio Orduña Lanuza; 578, Eugenio Cardona; 579, Gregorio Roncal; 580, Vicenté Alcober Alapont; 581, Juan Codoñer Blat; 582, Juan Codoñer Alegre; 583, Francisco Montesinos Checa; 584, Manuel Herranz; 585, Eliseo Perales Ferrer; 586, Ramiro Ruiz; 587, Emilio Ferrer Palomo; 588, Manuel Davaliñas López; 589, Juan Salas Tomás; 590, José Martínez Carmona; 591, Fausto Hernández Casajuana; 592, Mariano Moreno Ferrer; 593, Federico Puchol Casares; 594, Rafael Pascual; 595, Francisco Cherbuy.

Manuel Zabala, ĉe la Banko de Vizcaya, *Bilbao* (Hispanujo), interŝanĝos uzitajn poŝtmarkojn, per kvantoj da 100 ĝis 500, ne akceptante francajn nek anglajn.

REGULARO DE LA KLUBO K.K.K. 1. La nomo de la Klubo estas K.K.K.

* (*Koreklada Korespondanta Klubo*) *

2. Ĉiu membro estas devigata respondi korespondaĵon de alia membro kaj diri en la respondo, kiajn erarojn laŭ sia opinio li trovis en la ricevita letero, rilate al ortografio, gramatiko aŭ vortfarado. (Evitu disputojn pri stilo.)

3. Ĉiu membro ricevos numeron, kaj subskribas je nomo, aldonante: K.K.K. kun numero.

4. Ĉiu membro ricevos ĉiumonate nomaran tabelon de la aliĝintoj.

5. La kotizaĵo estas jare unu franko (dek pencoj). Poŝtsignoj estas akcepteblaj laŭ valoro (ĉiulandaj).

6. Tuta grupo povas aliĝi, kaj tiam ĉiuj nomoj de la grupanoj (kiuj deziras) aperos en la nomaro, sed per unu kotizaĵo la grupo ricevos nur unu ekzempleron de la nomaro ĉiumonata.

7. Oni povas aliĝi de la komenciĝo de ĉiu monato.

8. Plendojn pro ne-respondoj oni adresu al la Sekretario, kiu avertos la kulpulon. Post tri tiaj avertoj la kulpulo estos eksmembriĝota kaj strekota de la kluba Nomaro.

Kiu deziras membriĝi, skribu tuj al Sekretario, *S.^{ro} F. H. Salomon, 2, St. Stephen's Gardens, Twickenham, Anglujo*, enmetante poŝtsignojn (valoro unu franko).

La nomaro aperos la unuan de ĉiu monato, komencante la 1.^{an} de Oktobro, 1906.